

BELGA ESPERANTISTO

49a Jaro - N-ro 7a - Okt.-Nov.-Dec. 1957a

Fondita
en 1908a



Redaktoro-Administranto:
la Prezidanto de R.B.L.E.:

Maur. JAUMOTTE

Avenuo De Bruyn, 44

Wilrijk-Antverpeno

Oficiala monata Organo de

REGA BELGA LIGO ESPERANTISTA

Asocio sen profita celo,

aliĝinta al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Abonprezo:
Fr. 100,-

Le Beneluksa Kongreso en Charleroi

Verŝajne anstataŭota per Festo-tago(j) en Bruselo

Ekciinte ke niaj Nederlandaj unuigaj intencas organizi, en 1958, en propra lando, - kaj iom antaŭ la Pentekosta Kongreso - ĝeneralun jarkunsidon, por preparoli ĉiujn administrajn kaj propagandajn punktojn, la subskribinto skribis al la Prezidanto de L.E.E.N., por informi, ĉu li ne pensas, ke la sekvo de tiu ĉi decido estos, ke multaj samideanoj, kiuj jam ĉeestis tiun jarkunsidon, ne plu partoprenos la Kongreson.

La respondo de S-ro F. Weeke tuj venis:

*„La distanco estas por niaj mem-
broj longa kaj la vojaĝkostoj al-
taj; do tre verŝajne, ne multaj
iros tien”.*

Estis klare dirita, kiam R.B.L.E. proponis Charleroi, kiel kongresurbon ke la loĝado tie, kiel en Mons, kiel en Gento, kiel en Antverpeno, la kvar urboj je kelkdekaj kilometroj de Bruselo, iĝos tuta problemo. Sed ni nepre volis altiri la Nederlandanojn kaj doni al tiuj, kiuj ne havos alian okazon por viziti la Ekspozicion, eblecon tion fari dum la lunda tago; do dum la reirvojaĝo, ĉar Bruselo ja kuŝas sur tiu vojo al Nederlando.

Se ni konsideras ke tiu ĉi celo fakte plej grandparte nun forfalas, povas ŝajni, se ne absurde, tamen superflue preni necesan riskon por tiuj, kiuj ja partoprenos la Kongreson.

Tial S-ro H. Sielens, ĝenerala Sekretario, unue, kaj la subskribinto, en la posta kunsido, interrilatis en Charleroi kun la L.K.K.-anoj.

S-roj G. de Cuyper kaj R. Paulus, kiuj tiel vigle eklaboris kaj kiuj sukcesis, dum la lastaj monatoj, atingi la kvocienton 400 en la konkurso por la plialtigo de la membraro, estas pretaj rezigni momente sian taskon kaj repreni ĝin, kun nova kurajo, la sekvontan jaron aŭ je kiu ajn momento, kiam ni tion petos de ili.

En tiuj ĉi kondiĉoj la subskribinto

opinas, ke la administrantaro de R.B.L.E., - kiu tamen plej forte respondecas por la bona organizo de tiu ĉi Kongreso, - plej bone proponu al ambaŭ aliaj ligoj, anstataŭ, en 1958a, la Beneluksan Kongreson per la speciala Ekspozicia aranĝo en Bruselo mem, kiel tio jam okazis, dum antaŭaj Universalaj Ekspozicioj en nia lando, komencante per Gento en 1913a.

La detalojn pri la evoluo de tiu ĉi demando ni donos, eble, jam en nia sekvonta numero

Maur. Jaumotte

Prezidanto de R.B.L.E.

P.S. — Ni ĵus ekscias ke la Administrantaro de R.B.L.E. decidis proponi al ambaŭ aliaj Ligoj flandra kaj nederlanda, prokrasti la Beneluksan Kongreson en Charleroi, ĝis en 1959; kaj anstataŭ ĝin per Festa Tago en Bruselo.

Fantomoj de Neologismoj

De tempo al tempo ekgrumbas iu pri neologismoj en la verkoj de niaj elstaraj prozistoj kaj poetoj. Tial ni prilumu al ni iom la aferon.

Jam delonge nia literatura lingvo ne dronas en inundo de neologismoj, kiel dum certa periodo, en kiu ekfloris la t.n. skolo de Literatura Mondo. Legante verkojn de plej eminentaj majstroj de nia literaturo, kiel ekz. Kalocsay, Baghy, Rossetti, Auld, Szilagyi, Pérez, Boulton, Waringhien, Thorsen, Schwartz, Haugen, Rosbach, Francis, Dinwoodie, Carlsson, Rotkvič, Pumpr, Lapenna, Lukaŝ kaj pluraj aliaj, ni rimarkas, ke ili relative tre sin-
garde enkondukas en siaj verkoj novan esprimon, neologismon. Plej ofte temas pri bezonata nuancvorto aŭ utila sinonimo, kaj malofte povus pravi
riproĉo pro arbitra elekto de nebezo-

Pro translokigo de la nederlanda presejo, kiu prizorgis ĝis nun la eldonon de nia revuo, tiu ĉi numero aperas kun iom grava prokrasto, tute sendependa de nia bona volo.

Pro tio, ni decidis ke estos la lasta numero, presata eksterlande: Ekde nun, la regula aperigo de nia revuo iĝos pli facila, ĉar ankaŭ la redaktadaj servoj estos kunigataj en Belgujo.

Ni kaptos la okazon por doni al nia revuo pli plaĉan aspekton: la formato estos pli malgranda; sed la nombro de la paĝoj estos almenaŭ duobla kaj bela kovrilo entenos la tuton.

Ĉiujn du monatojn ĝi aperos regule, kiel eble plej frue en la neparaj monatoj.

La Grupoj do bonvolu ensendi siajn komunikojn plej laste la 15an de la paraj monatoj kaj, - por la numero de januaro-februaro, - ili bonvolu resumi plej mallonge la okazintaĵojn, ĉar temos pri tuta monattirio.

nita neologismo. 95% de t.n. neologismoj, kiujn ni renkontas, devenas el la stoko de Parnasa Gvidlibro kaj estas do uzataj pli ol kvaronjarcenton. Ili reaperas en ĉiuj ĉefverkoj de nia originala kaj traduka poezio kaj parte en beleto, kaj devus propre ne plu nomiĝi neologismoj, sed poeziaj faktermoj. Des pli, ke grandan parton de ili (bedaŭrinde pluraj taŭgaj kaj ofte uzitaj mankas tie) jam listas la Suplemento de Plena Vortaro.

La plendantoj kontraŭ tiu ĉi solida kaj enradikiganta provizo da novaj nuancesprimoj kaj sinonimoj rekrutiĝas plejparte el la adeptoj de lingva simpleco kaj porĉiupreza facileco. Inter ili kaŝiĝas ne tiom da ostecaj konservativuloj, kiom da malpenemaj pi-

(Sekvo sur p. 53)

D-ro Marek Waysblum

Lingvoj kontraŭ scienco

La sekvanta artikolo speciale bone taŭgas por sciencaj aŭ ĝenerale kulturaj revuoj. La Fakto Informado de UEA sugestas, ke vi traduku ĝin en vian nacian lingvon kaj aperigu en unu el vialandaj bonaj kaj seriozaj revuoj. — Estas provo kiu meritas esti farata.

La „Naŭa Raporto de la Konsila Komitato pri Scienca Politiko, 1955 — 1956“ (eldono de la Registara Librejo, Britujo) alarmas pri la malplezura fakto, ke lingva ekipeto de la edukitaj klasoj ne plu sufiĉas por sekvi progreson de moderna scienco kaj tekniko. Tiu alarmo estas ŝuldata al la ekkonscio ke, grandparte pro siaj lingvaj limigoj, la okcidentaj nacioj ne povas iri sampaŝe kun la rusa scienco kaj ne kapablas mastri la kreskantan produktadon de la rusa scienca teknika literaturo. La raporto konkludas: „La unua paŝo farota estas akceli la instruon de la rusa lingvo kiel grava moderna lingvo en la lernejoj kaj universitatoj“. Kaj ĝi sugestas, ke dume povus iagrade helpi la pliiĝo de kursoj de la rusa lingvo por sciencistoj kaj teknikistoj plenumantaj sian armesecon.

Neniu neos ke la alarmo de la Komitato estas tute prava kaj ke ties konkludoj estas almenaŭ pravigebaj. Laŭ la Raporto inter la britaj sciencistoj, 80 — 90 % scipovas legi la francan lingvon, kies proporcia partopreno en la internacia scienca literaturo estas multe sub tiu procento; nur 60 % scipovas legi la germanan lingvon, dum la procento de tiuj kiuj kapablas kompreni sciencajn literaturon de slavaj kaj ne-eŭropaj landoj estas tute nekoniderinda. Paralelaj nombroj por iliaj amerikaj kolegoj estus ankoraŭ pli malaltaj.

En la nunaj tempoj la kono de almenaŭ kvin lingvoj (angla, germana, rusa, franca, itala) estas necesa por sekvi nur la ĉefajn sciencajn kaj teknikajn fluojn; la hispana lingvo ekaperas sur la horizonto pro la rapida progreso de Suda Ameriko; la japana lingvo levigas kiel unu el la gravaj lingvoj de sciencoj ekzaktaj kaj humanismaj el malantaŭ ties provizora angla fasado; la proksimaj jardekoj alportos la ĉinan lingvon kaj novsanskriton kaj la fino de la nuna jarcento povas aldoni la araban lingvon al la lingvista studprogramo de kon-sciencaj sciencistoj kaj teknikistoj. Se do la konsilo de la Komitato estas sekvota ĝis ties logikaj konkludoj, la lingvistaj branĉoj estas aldonitaj al niaj teknikaj kaj sciencaj lernejoj kaj armeaj kaj maristaj rekrutoj ŝvitados super pli kaj pli multaj gramatikoj kaj vortaroj, ĝis fine niaj sciencistoj kaj teknikistoj kapablos egaligi siajn similulojn el aliaj landoj. Komprenibile, ŝupozante ke ankoraŭ restos iom

da spaco por laboratorioj en la politeknikoj kaj ke la studentoj povos trovi iom da tempo por kemio kaj fiziko post siaj superfortaj lingvistaj studoj!

Ne eblas haltigi la universaligon de la scienco kaj tekniko, precipe pro la fakto, ke en la reganta sistemo de konkura ekonomio la gvidaj nacioj devas bazi sian ekonomian ekspansion sur eksporto de sia teknika scio — ne nur por sekurigi mendojn por siaj teknikaj varoj, sed ankaŭ por krei kondiĉojn por siaj eksterlandaj investoj. La eksporto de teknika scio estas akompanata de lingva ekspansio kiu, en la unua etapo, estas necesa antaŭkondiĉo por efika asimilo de tiu scio kaj, en la postaj etapoj, estas aldona sekurigo por la rega pozicio de la eksportanta lando. Fine, tamen, tiu teknika kaj scienca importado, asimilite, tendencas eniĝi en novan lingvan formon: la ricevanta nacio asimilas ilin en sia propra lingvo, unue, por sekurigi la ekonomian efikecon de la lernita tekniko kaj, due, ĉar la studo de scienco transformiĝas en krea partoprenon en la progreso de la moderna kulturo kaj civilizo.

Tiel do la universaligo de scienco kaj tekniko estas akompanata de ilia paralela lingva diversiĝo, ĉar ju pli universaligas ties kono, des pli multaj lingvoj estas uzataj por esprimi la atingojn de scienco, kaj la antaŭa regado de kelkaj grandaj lingvoj estas abolata. Pro tiuj konflikta tendencoj aperas paradoksa situacio: la nacioj, kiuj nur ĵus eniris la sferon de sciencaj esploroj kaj ankoraŭ dependas de la atingoj de la gvidaj nacioj, povas pli facile kaj pli efike profiti la avantaĝojn de la universaligo de scienco kaj tekniko, ol iliaj instruistoj mem. Rezulte la ritmo de la progreso de la gvidaj nacioj tendencas malvigligi kompare kun iliaj novaj konkurantoj. Fine do la tendenco al lingva universaligo pere de la universaligo de iu nacia lingvo detruas sin mem, intensigante la tendencon al lingvo diversiĝo de la moderna kulturo kaj civilizo.

Ni memoru, ke en la kondiĉoj de konkura ekonomio „scienco“ samsignifas kun ekonomia efikeco, kaj ekonomia efikeco estas necesa kondiĉo de politika povo, kiu siavice sekurigas la ekonomian pozicion de la koncerna lando.

Estas klare, ke la lingva diversiĝado de la scienco kaj tekniko ludas iun

rolon (eĉ se ne tre konsiderindan) en tiu situacio kiu povas konduki al katastrofo. Certe, estus stulte kaj eĉ krime rifuzi ŝancon al la ne sufiĉe progresintaj nacioj rilate al aliaj pli prosperaj najbaroj, kaj neniu kulturkonscia homo serĉos rimedon kontraŭ la lingva diversiĝo nur por sekurigi la superecon de unu nacio super la alia. Estas, tamen, evidente, ke tiuj du konfliktantaj tendencoj en la evoluo de la scienco kaj tekniko celas detrui unu la alian kaj ke la lingva diversiĝo bremsas la teknikan kaj sciencon progreson de la homaro. Nek unu nek la alia tendenco povas esti haltigita, ĉar ili kondiĉas sin reciproke. Kaj tamen devas esti iu eliro el tiu sorĉita cirklo: vojo al integriĝo de la scienco devas esti trovata.

Kiam la latina lingvo estis LA lingvo de la kulturo, la scienco estis universala kaj homogena samkiel la kono de la universala lingvo. En la periodo de la regado de kelkaj lingvoj la scienco ankoraŭ estis universala kaj homogena, ĉar sciencistoj aŭ teknikistoj ankoraŭ povis mastri la lingvan amplekson de sia intereso. Nun ni ĉeestas komenciĝon de nova periodo.

Ni memoru, ke la „latina scienco“ estis universala nur en la limoj de la „latina mondo“ kaj ke paralele kun tiu mondo kaj paralele kun tiu scienco ekzistas aliaj mondoj kaj aliaj sistemoj de scienco, egalaj aŭ eĉ superaj al la nia, sed izolitaj pro distancoj kaj lingvaj baroj. La okcidenta scienco, la heredaĵo de la latina kulturo, ekmastris la mondon kaj fariĝis LA-scienco, la universaligita monda scienco. Tamen, tuj kiam tio estis atingita, la mondo de scienco denove disfalis en lingvajn sferojn reciproke nepenetreblajn. Aperas perspektivo de revuo al la Mezepoko, al paralela ekzistado de izolaj kultursferoj. Sed tio apenaŭ estas atendebla. Kiel montras la evoluo de la atomtekniko en okcidento kaj en oriento, ekzistas miriga paraleleco en la ĉefaj linioj de scienca penso, eĉ en kondiĉoj de absoluta kaj deviga izolo. La tutmonda komunado de la scienco estas senkompare pli universala ol iam estis la latina komunado. Neeblas reirigi la horloĝon. Evitebla tamen kaj evitenda estas tiu paralelismo, tiu senutila malŝparo de homa energio por reinventado de inventaĵoj, tiu malakcelado de la homara progreso.

Unu vojo gvidas al tiu celo koste de la kreadoj kaj disvastigantoj de la scienco kaj tekniko. Ĝi postulas individuajn kaj kolektivajn ekmastron de la tuta lingva amplekso de la scienca kaj teknika progreso kaj ties reintegrigo pere de iu organiza aparato. Eĉ se estus malkonsiderata la giganta ekonomia kaj kultura kosto de tiu solvo, ĝi gvidus fine al absurdo, ĉar

BELGA KRONIKO

Prezidanto: S-ro Maur. JAUMOTTE, De Bruynlaan, 44, Wilrijk.

Vicprezidanto-Kasisto: S-ro J. Soyeur, 91, Rue du Chêne, Seraing.

Vicprezidantino: S-ino J. Plyson, 185, rue Jourdan, Bruselo.

Ĝenerala Sekretario: S-ro H.Sielens, „Internacia Marista Domo“, Falconrui, 21, Antverpeno.

(Poŝtĉeknumero: R.B.L.E.: 18.37.67)

ANTVERPENO

Esperanto-Grupo „La Verda Stelo“.

(Poŝtĉeknumero: 726.54)

La 16an de aŭgusto, pro la antverpena kermeso ne okazis kunveno.

La 23an sveda samideano S-ro E. Fernström vizitis la grupon kaj montris du interesajn kolorigitajn sonfilmojn pri la organizo de la svedaj fervojoj kaj pri bela kaj multe vizitata regiono de Svedujo. La Prezidanto S-ro M. Jaumotte aplaudigis la paroladiston, kiu lerte tradukis la svedajn komentariojn de la filmoj.

Poste el la partoprenintoj al la 42a

la universaligo de la sfero de la progreso metadus sur la sciencon kaj teknikon ŝarĝon ne nur ĉiam pli kreskantan, sed ankaŭ neproduktan kaj neekonomian el la vidpunkto de la propraj taksoj kaj atingoj de la scienco kaj tekniko.

La alia solvo estus agnoski la universalalecon de la scienco kaj ties lingvan diversiĝon kiel fakton nerenverseblan kaj doni al la progresanta universaligo propran lingvan medion, ne dependan de la paralela proceso de lingva diversiĝo, sed samtempe alasantan ĝin. Tiu medio povas esti nenio alia ol la Lingvo Internacia.

Estus vane atendi tiun konkludon de la oficialaj konsilaj komitatoj de gvidaj nacioj. La sfero de la angla lingvo en scienco kaj tekniko ampleksas ne nur la du plej progresajn naciojn de la mondo, sed ankaŭ iliajn koloniajn aŭ eks-koloniajn dependaĵojn, kaj la persista peno-konservi la regan pozicion de la angla lingvo klare vidiĝas en ties ekspansiaj tendencoj. La rusa lingvo konkeris por si sferon novan kaj vastan, agante kiel portanto de teknika progreso al kelkaj t. n. popoldemokratiaj landoj penetris ekster tiu sfero en zonojn de eks-koloniaj aziaj landoj. La ekstreme centrigita kaj komplike organizita aparato de la rusa scienco grandparte sekurigas al ĝi profitadon el la atingoj de aliaj nacioj. Eĉ se la soveta politiko ŝanĝiĝos de lingva imperiismo al lingva kunekzisto, la konkuraj valoraj de la rusa scienco kaj tekniko donados al la rusa lingvo ekspansiisman stimulon certe nefavoran al lingva internacismo.

Efikan gvidon al lingva integriĝo

Universala Kongreso en Marseille, S-ro Luc De Marré, kiu estis delegaciata de la Prezidanto S-ro M. Jaumotte por ĉeesti ĉiujn administrantajn kunsidojn, tre fidele plenumis tiun taskon kaj kiel esperantisto kiu por la unua fojo kunestis Universalan Kongreson, fajre raportis pri la diversaj laborkunsidoj kaj emociplene priskribis la solenan malfermon, aldonante generalajn impresojn.

La 30an, S-ro L. De Marré daŭrigis kaj finis sian laŭte aplauditan raporton por doni la okazon al S-ro R. Van Eynde ne nur raporti, sed ankaŭ montri belajn lumbildojn kiuj revokis la

per la Lingvo Internacia donas:

A. la nacioj kiuj, celante aliĝi al la progreso de la civilizo, dolore speras la lingvaj malfacilaĵojn, sed pro akuta sento de nacia konscio ne emas subiĝi al ies lingva supereco;

B. la nacioj kree partoprenantaj en tiu progreso, sed spertantaj la samajn malfacilaĵojn, kiel la nacioj de la unua grupo;

C. la nacioj, kies scienco kaj tekniko jam atingis etapon de aktuala aŭ potenciala internacia ekspansio, sed estas malhelpataj de lingvaj baroj.

Oni ne trompu sin mem pri la motivoj akcelantaj la krekson de Esperantlingve scienca literaturo en tiaj landoj, kiel ekz. Japanujo, Jugoslavio, Nederlando, Skandinavio ktp. Almenaŭ iagrade ĝi estas ŝuldata ne nur al internaciismaj tendencoj, sed ankaŭ al naciismaj motivoj. Ni vidis, ke la lingva imperiismo tendencas detrui sin mem, ĝermigante lingvan diversiĝon en la scienco kaj tekniko.

Aliflanke, la lingva naciismo povas krei tendencojn al lingva internacismo.

Certe, estus malprave tute fidi al tiu proceso. Ĝi bezonas potencon korektilon en la internacia ideo kiel motora forto al universaligo de kulturo kaj civilizo. Lingva imperiismo kaj naciismo kaj naciismo en sfero de scienco kaj tekniko kreas antaŭkondiĉojn por lingva universalismo, por lingva reintegrigo de scienca kaj teknika progreso pere de la Lingvo Internacia.

El germana Esperanto-Revuo. Aŭg. 1957.

REGA SOCIETO.

Ni kun ĝojo eksciis, ke la „Esperantista Brusela Grupo“, kies oran jubileon ni festis antaŭ kelkaj monatoj, akiris la rajton nomiĝi „Reĝa Societo“.

S-ro R. Jacobs solene ricevis la diplomon, kiu tion priatestas kaj komunikis la informon dum la lasta administrantara kunsido de R.B.L.E.

Ĉiuj niaj membroj ĝojos pro tiu ĉi oficiala honorigo, rekompenco pro la gravega laboro efektivigita, dum tuta duonjarcento, de multaj fervoraj gesamideanoj en nia Ĉefurbo.

Al ĉiuj, la mortintoj kaj la nun ankoraŭ vivantaj kaj daŭrigantaj, ni ŝuldas grandan dankon!

agrablajn tagojn en Marseille. S-ro Van Eynde kiu faris la vojaĝon al la Kongresa urbo en la aŭtomobilo de S-ro De Marré kaj akompanata de S-ino J. De Hondt kaj F-ino M. Moriamé (kiuj ambaŭ prizorgis parton de la lumbildoj) ankaŭ havis tiom direda ke li dum la kunveno de la 6a de septembro devis daŭrigi sian raportadon. Tiun vesperon ankaŭ F-ino Elvire De Coene, lernantino de la lasta kurso, prezentis lumbildojn pri sia vojaĝo al Mallorca, kiujn ŝi komentariis per klara voĉo, denove pruvante ke Esperanto estas praktikebla tuj post tre mallonga studado. Ŝi plene meritis la laŭdajn vortojn de la Prezidanto. Poste S-ino L. Merckx, pere de lumbildoj kaj laŭ tre amuza maniero, rakontis sian vojaĝon al Italujo kaj Svisujo. La riĉoj ofte aŭdigis kaj en tre gaja atmosfero la Prezidanto dankis kaj konkludis la vesperon.

La 13an, S-ino L. Bernaerts, ununura belgino kiu ĉeestis la antaŭkongreson en Parizo, kie la diverslandaj Popoluniversitatoj kunvenis en la sidejo de UNESCO, raportis, laŭ sia propra maniero, pri la disvolviĝo de tiu Esperanta manifestacio dum la publiko atente aŭskultis.

S-ro R. Balleux, per multaj lumbildoj, montris la belan vojaĝon, kiun li kun sia edzino faris al Oberammergau en la suda parto de Germanujo. La paroladisto bone skizis la atmosfere-

G. FAES

16, Schoenmarkt, 16

ANTVERPENO

— Por via MUZIKO
RADIO kaj GRAMOFONO



Ankoraŭ memore al nia Beneluxeranto-Kongreso en Eindhoven

ron de la regiono kaj la diversaj pitoraj detaloj donis ankoraŭ pli da koloro al la parolado. Pro la malbona vetero la ekskurso al Westmalle antaŭvidita por dimanĉo posttagmeze, la 15an, estis prokrastata.

London, la 16an je la 20a h. en la lernejo de Belgiole, 99 komencigis la elementa kurso gvidata de S-ro Luc De Marré. Kvindek da gelernantoj enskribiĝis. S-ro Maur. Jaumotte faris la enkondukan paroladon kaj per la materialo de la Fondajo Henriette Toussaint malgranda ekspozicio estis aranĝata en la halo de la lernejo Ĝi vekis grandan intereson inter la novaj gelernantoj. Iĝis vera sukceso.

La 20an, EKI-vespero estis organizata, dum kiu S-ro Maur. Jaumotte, prezidanto de EKI, paroladis pri siaj „Vojaĝimpresoj de Hispanujo“, impresoj, kiujn li spertis dum trisemajna restado kaj vojaĝo tra la Iberia duoninsulo. Multnombra ĉeestantaro atente priaŭskultis la tre detalajn klarigojn de la paroladisto, kiu krome ilustris sian raporton per amaso da lumbildoj diversaspektaj. S-ro F. Volders, reprezentanto de F.I.L.E. kaj komitatano de EKI, per trafaj vortoj dankis S-ron Jaumotte nome de EKI dum la publiko entuziasme aplaudis. Bela vespero.

Programo de la venontaj kunsidoj:

Ĉiuvendrede en „Witte Leeuw“, Frankrijklei, 4 je la 20,15h. (la etaĝo).

Novembro: la 1-an: pro festotago ne kunveno; la 8an: Filmvespero (S-ro Montmirail); la 15an: Teatra Elsendaĵo; la 22an: Amuza Vespero (S-ro Roger Jaumotte); la 29-an: Parolado kun lumbildoj de S-ro Lecat: „Cambridge, ĝiaj universitato kaj kolegioj“. **Decembro:** la 6an: Sta Nikolaa Festo; la 13an: Zamenhofa Vespero (EKI); la 20an: Kristnaska Atmosfero; la 27an: Rerigardo de la jaro;

Naskiĝo

En antaŭa numero nia anoncis la aviĝo, por la kvina fojo, de S-ro Morris De Ketelaere. Pro naskiĝo en la hejmo de niaj bonaj geamikoj G-roj H. Jacques-De Ketelaere de fileto Steven, li iĝis avo por sesa fojo.

Al la feliĉaj gepatroj, al la geonkloj, kiel al la „ĉevronita avo, niajn korajn gratulojn.

BRUĜO.

Bruĝa Grupo Esperantista.

(Poŝtĉeknumero: 4835.33)

La kunveno de la 13a de aŭgusto estis ĉefe dediĉata al komuna legado de B.E. — Parolata gazeto aperis dum la kunveno de la 20a kun interesaj kontribuoj de: F-ino L. Vermeersch pri „Stranga Aventuro“ kaj de S-ro Ch. Poupeye pri „William Harve, angla kuracisto, 1578—1657“, dum F-ino G.

Wybouw tre amuze prizorgis la humorajan angulon. Ankaŭ ŝi, dum la kunveno de la 27a, plej interese paroladis pri sia libertempa kaj peresperanta vojaĝo al Svedujo kaj Danujo.

La 3an de septembro, komuna legado de B.E. plenigis la plej grandan parton de la vespero.

La 10-an de septembro okazis kunveno pli grava ol kutime. Multaj membroj kaj kelkaj invititoj ĝin ĉeestis. S-ro Ch. Poupeye, grupa prezidanto salutis la ĉeeston de S-ro. M. Jaumotte, prez. R.B.L.E. Tiu ĉi lasta tiam ekparolis por honorigi du membrinojn de la grupo kaj de la ligo, la fratinojn: S-inon Suzanne Verbeke-Vandenberghe, grupan vicprezidantino kaj S-inon. Marie-Joséphine Viane-Vandenberghe, antaŭan helpan sekretariino, al kiuj li surbrustigis la ligan medalon pro dudek-kvinjara fideleco, sub entuziasma aplaŭdado de la ĉeestantoj. Poste S-ro. Jaumotte prezentis paroladon pri siaj „Vojaĝimpresoj tra Hispanujo“. La elokventeco de la parolanto kaj la beleco de la multegaj lumbildoj katenis la atenton de la ĉeestantoj dum preskaŭ du horoj.

London, 16an de septembro, rekomencigis ankaŭ la vintra aktiveco en la grupa sekcio de St-Michiels. Diplomoj pri elementa lernado estis disdonataj al la ekzamenitoj de la pasintjara kurso: F-ino Maria-Anna Debrauwere,

S-ro Joannes De Laender kaj S-ro René Ramon. La grupa prezidanto, S-ro Poupeye, gratulis la diplomitojn kaj ili ajn sinsekvajn kursgvidintojn, S-rojn Robert Lagast kaj Raoul Behaeghel. Tiu lasta tiam komencis novan kurson por progresantoj lerte gvidatan kaj atente aŭskultatan. Dua leciono de tiu progresiga kurso estis donata la 23an.

Mardon 17an, malfermiĝis la nova elementa kurso sub gvidado de S-ro Poupeye en la grupa sidejo „Cornet d'Or“. Bedaŭrinde nur malmultaj novaj gelernantoj enskribiĝis. Post la unua leciono, okazis la kunveno, dum kiu la novaj gelernantoj kaj la malnovaj membroj agrable interkonatigis.

La 24an de septembro: plia leciono de la sama kurso, post kio la kunveno okupiĝis pri la organizo de la grupa balo de la 12a de oktobro por finiĝi per amuza kaj lerniga portretludado.

PROGRAMO DE LA VENONTAJ KUNSIDOJ

1-e/ ĉiulunde, je la 8a vespere, en la komunuma lernejo de St-Michiels, leciono de la perfektiga kurso sub gvidado de S-ro. R. Behaeghel, sekvata de lernigaj amuzajoj.

2-e/ ĉiumarde, en la grupa sidejo „Gouden Hoorn-Cornet d'Or“ Simon Stevin-plaats, 2, Tel. 314.59:

a) je la 8a vespere: lecionoj de la

elementa kurso.

b) je la 9-a vespere: grupa kunveno laŭ jena programo:

NOVEMBRO: 5an: Kanta vespero; 12an: Konkursoj sub gvidado de S-ro R. Behaeghel; 19an: Parolata gazeto; 26an: Legado de B.E.

DECEMBRO: 3an: Surpriza vespero kun nekonataj premioj; 10an: Kanta vespero; 17an: Lastaj lecionoj de la elementa kurso en Bruĝo. Rememoro al D-ro Zamenhof; la 24an, antaŭtago de Kristnasko kaj la 31an, antaŭtago de Novjaro, ne okazos kuveno. Inter la 17a de decembro kaj la 7a de januaro, estas antaŭvidata finjara festeto, pri kiu detaloj aperos en sekvonta numero.

Kondolencoj

Al S-ro Raymond De Buysere, membro de la Grupo, pro la morto de lia avo, S-ro Alph. De Buysere (29.7.57).

Al S-ro Manteleers-Van der Biest kaj al F-ino Simone Manteleers, pro la morto de ilia edzo kaj patro S-ro Theodoor-Jan Manteleers (ĉiuj tri membroj de la Grupo; 23.10.57).

BRUSELO.

Reĝa Esperantista Brusela Grupo.

(Poŝtĉeknumero: 12.30.48)

La 29an de julio okazis komuna legado de la libro „Miru, Pensu, Ridu“

LES ENTREPRISES

DERKS

226, Rogierstrato, BRUSELO

Tel.: 15.19.92

Entrepreno de
KONSTRUAĴOJ

ĉiu membro laŭvice laŭlegis tekstpartojn pri diversaj temoj.

La 5an de aŭgusto la parolata ĵurnalo havis neatenditan sukceson, pro tio, ke la plej multaj ĉeestantoj partoprenis. S-ro Jirousek anstataŭis S-ron Jakobs, kiu forvojaĝis al Skotlando.

Plej multajn poentojn akiris: S-ro van der Stempel por la tradukita teksto: „La Mirindaĵo de la Fajro“ kaj S-ro Schumacher por la legita teksto: „Proceso“. Kiel pridiskutinda temo estis elektata: „Kie estas Feliĉo?“, prezentita de F-ino Kestens.

La 12an okazis komuna legado el la libreto: „Bonhumoraj Rakontoj de nuntempaj Verkistoj el la Hungara Literaturo“. La ĉeestantoj multe taksis la diversajn pecetojn, kiuj permesis al ili konatiĝi kun la tipa spriteca sen-

Paroladoj de nia Liga Prezidanto

Kun la celo helpi al la revigligo de la vivo en la diversaj lokaj Grupoj, nia Liga prezidanto, dum la tuj postlibertempaj semajnoj, vizitis kunvenojn en Bruĝo, Bruselo kaj Charleroi kaj faris tie paroladojn.

En Bruĝo kaj Bruselo, S-ro M. Jau-motte pritraktis sian vazaĝon al Hispanujo, kaj montris multajn kaj belajn lumbildojn. En Charleroi, li faris franclingvan propagandan paroladon, kiu vere plaĉis kaj forte interesis la ĉeestantojn.

En Bruĝo kaj Bruselo, li kaptis la okazon por havigi la medalon de nia Ligo al kvar jubileantinoj: S-inoj Suz. Verbeke-Vandenbergh, M. J. Viane-Vandenbergh, Julia Plyson kaj F-ino Kestens, al kiuj ni rediras niajn korajn gratulojn.

to de la simpatita Hungara popolo.

La 19an S-ro van der Stempel gvidis la perfektigan kurson pri: „Du komplementoj en sama frazo” kaj „La tempesprimoj kun kaj sen akuzativo”. La konversacia parto temis pri „Kiel oni pretigas la tablon”.

La ĉeestantoj amuziĝis kaj instruiĝis. La 26an ĉeestis kiel gastoj, S-ro van den Bossche kaj lia fratino, el Antverpeno.

S-ro Jacobs montris la diplomon, kiu rajtigas la grupon porti la titolon: „R E G A Esperantista Brusela Grupo” kaj li priskribis la solenaĵon, dum kiu tiu honora diplomo estis transdonata.

S-ino Stern gvidis amuzan vesperon: la grupanoj devis respondi al pluraj demandoj, precipe pri la historio de Belĝujo kaj Francujo. Poste, ĉiuj membroj laŭvice devis fari improvizitan demandon al la ceteraj. La plej multajn bonajn respondojn donis: S-ino Staes kaj S-ro Weyn.

La 2an de septembro S-ro Jacobs dankis F-inojn Obozinski Kestens Isaakson, pro la grava laboro farita por la Esperanto-ekspozicio en „Palais Mondial” (Mundaneum). F-ino Obozinski raportis pri la inaŭguro de tiu ekspozicio.

Ĉe la parolata ĵurnalo, S-ro Castel akiris la plej multajn poentojn, por la treege sprita, tradukita teksto: „Feina Rakonto”.

La 9an F-ino Obozinski kaj S-ino Plyson prelegis pri sia vojaĝo tra Sicilio. Laŭvice, ambaŭ parolantinoj pritraktis historiajn kaj turismajn aspektojn, priskribojn de pejzaĝoj, monumentoj, urboj, trajojn de la Sicilia popolo kaj ankaŭ personajn impresojn. Neniu vidpunkto mankis al tiu zorge kaj detale komplita dokumentaro.

S-ino Ernst klare kaj emfaze laŭlegis la tekstojn de S-ino Plyson.

Granda estis la atento de la aŭs-

UNIVERSALA ESPERANTO - ASOCIO

En Konsultaj Rilatoj kun U.N.E.S.C.O.
EENDRACHTSWEG 7. ROTTERDAM C.. NEDERLANDO
Telefona 128313

Estimataj Samideanoj,

La Komitato de U.E.A. en sia kunsido la 9-an de aŭgusto 1957 en Marseille akceptis unuanime la sekvantan rezolucion por diskonigo al vi ĉiuj:

„SITUACIO EN USONO

La Komitato de U.E.A. ekzamenis la situacion en Usono kaj kun plezuro konstatis, ke la tiea neŭtrala landa asocio, Esperanto-Ligo por Norda Ameriko (ELNA), konsiderinde fortikiĝis kaj ke la membraro de U.E.A. en Usono tre kreskis, tiel ke Usono nun okupas la unuan lokon en la Internacia Konkurso de U.E.A. Samtempe la Komitato konstatis, ke G.A. Connor kaj grupeto da personoj ĉirkaŭ la t.n. „Amerika Esperantisto” daŭrigas sian kampanjon de kalumnioj kontraŭ U.E.A. kaj ĝiaj funkciuloj.

La Komitato atentigas la tutan esperantistaron, ke ĝi eksigis G.A. Connor el U.E.A. pro lia peze kalumnia agado kontraŭ la Asocio kaj kontraŭ la Esperanto-Movado ĝenerale, kiel ankaŭ pro liaj falsaj denuncioj (vidu la protokolon de la

kunsido en Kopenhago, Jarlibro 1956 Dua Parto, paĝo 91).

La Komitato do alvokas ĉiujn Esperanto-Organizaĵojn Ĉefdelegitojn, Perantojn, Delegitojn, Redakciojn de Esperantaj gazetoj, la Esperanto-Eldonejojn kaj Libroservojn, kiel ankaŭ la unuopajn esperantistojn, interrompi kun tiu persono kaj kun „Amerika Esperantisto” ĉiujn rilatojn, eĉ pure komercajn. La solaj reprezentantoj de la neŭtrala Esperanto-Movado en Usono estas la Esperanto-Ligo por Norda Ameriko (ELNA), Esperanto-Domo, 767 United Nations Plaza, New York City (17), New York, kaj la Ĉefdelegito por Usono, S-ro D. E. Parrish, 328 West 46th Street, Los Angeles 37, (Cal.).

Ni aparte atentigas niajn ĉefdelegitojn kaj perantojn, ke ili ne povos peri abonojn al „Amerika Esperantisto”, kiel tio estas sugestita en varbaj cirkuleroj akompanantaj tiun gazeton.

M. H. Vermaas,
Direktorino C.O.

Verreries et Miroiterie DESMECHT & C°

LA LOUVIERE

S.P.R.L.

Tel. n-roj 223.01 - 225.37

Du esperantaj markoj:

TABULO, por lernejtabuloj; KATOKULO, por signalvitroj.

kultantoj, kiuj vere povis kunvivi la mirindan vojaĝon de la prelegantinoj! Entuziasmaj aplaŭdoj danke rekomprencis ambaŭ oratorinojn.

La 16an de septembro, ni havis la plezuron vidi en nia rondo Ges Derckx, kiuj por kelkaj bonagoj loĝas en Bruselo. La Prezidanto afable anoncis al ili, ke venontjare, nia grupo festos ilian 50-jaran Esperantistecon. La perfektiga kurso de S-ro van der Stempel pritraktis i.a. la diversajn manierojn laŭ kiuj oni esprimas la ĝustan tempon en Esperanto. La konversacileciono temis pri: „La Dormoĉambro”.

Programo de la venontaj kunsidoj.

ĈIULUNDE, je la 20a h., en „BRASSERIE DE LA JUSTICE”, 38, place du Grand Sablon, Bruselo la; (Tel. 12.64.76) Novembro; la 4an: Unesko Datreveno: prelego de S-ro Castel; Parolata ĵurnalo; la 11an: ne kunveno pro festotago; la 18an: Perfektiga kurso de S-ro van der Stempel; la 25an; Distra vespero gvidota de S-ino Staes.

Decembro: la 2an: Parolata ĵurnalo;

Niaj kotizoj

Kvankam la jaro ne finiĝis, ni volas presigi, jam ekde nun en tiu ĉi numero, la kotizojn por la jaro 1958, pro la fakto ke, se la kotizoj pir la Grupoj kaj por R.B.L.E. restos senŝanĝaj, tiuj de la diversaj kategorioj de individuaj membroj de U.E.A. tamen plialtiĝos, pro decido farita dum la lasta Universala Kongreso.

Ĉe pago de siaj kotizoj al siaj grupaj kasistoj, niaj membroj do bonvolu atenti:

Simpla membro	Fr. 100.—
Familia Membro	Fr. 50.—
Junulo-Simpla M.	Fr. 50.—
Kadeto-Simpla M.	Fr. 25.—
M. Abonanto UEA.	Fr. 270.—
M. Jarlibro UEA.	Fr. 185.—
Junulo-M.Ab. UEA.	Fr. 135.—
Junulo-M. Jarl. UEA.	Fr. 92.50
Membro Subtenanto	Fr. 400.—

Ĉiuj tiuj ĉi kotizoj, krom la Familia Membreco, enhavas la abonon al „Belga Esperantisto”.

Junulo estas membro 18-21 jara; kadeto, membro malpli ol 18 jara.

Oni, dum julio kaj aŭgusto, ankaŭ laboris pri diversaj projektoj por la vintra sezono, nome pluraj prelegoj.

La 5an kaj 20an de septembro, okazis du kunvenoj de la L.K.K., dum kiuj estis definitive fiksata je la 10a de oktobro, propaganda prelego de S-ro Maur. Jaumotte, Liga Prezidanto, en hotelo „Le Résidence”.

La 10an, la prezidanto S-ro G. de Cuyper komencis gvidi novan kurson por kvin novaj lernantoj. Tiu ĉi kurso okazas ĉiumarde.

(Sekvo de p. 47)

gruloj, por kiuj ŝajnas nevalore ellerni la 200—300 radikojn.

Sed en la lasta tempo turnis sin al Akademio de Esperanto Aŭstria Esperanto-Instituto, petante intervenon kontraŭ „neologismoj”. Supozante, ke sub tiu nomo ne kaŝiĝas iu lingva rigidulo, sed vere grupo da bonintencaj samideanoj, kaj ĉar ili samtempe aprobas la laŭdindan intervenon de la Akademio kontraŭ la ridinda fuŝvortaro de Azorin, indas pli detala ekzameno la problemon. Samtempe mi volas ankaŭ respondi al s-ano Drs. F. R., kiu en la aprila n-ro de Svisa Espero pafas eĉ per pli pezaj kalibroj, malgraŭ, ke tiuj trafas tute preter la celo.

Estas jam konate kaj ripetite, ke lingvo en diversaj fakoj de homa agado devas uzadi por fakaj nocioj riĉan fakterminaron. Tion espereble neniu pridubas. Nek tion, ke sciencaj kaj teknikaj nomoj estu unuecaj, sen balastaj sinonimoj. Nur dank' al nedisciplinemo de la lingvouzantoj kaj vortnormiga postlamado de la Akademio — cetero finance por tiu celo malsu-

fiĉe dotita, — ni havas tiajn balastajn paralelaĵojn: rangifero-boaco-norda cervo, kobajo-kavio, nacisto-nacio, Koreo-Koreio, Izraelo-Izraelio-Israelo k.s. Tio estas do elskaranda.

Sed kiu komprenas, ke Esperanto havas pli altajn ambiciojn, ol esti nur seka teknika aŭ ekzakte komunika lingvo, ke ĝi pretendas taskojn de arto kun ĝia multvaria belo, ke ĝi volas plenumi ĉiujn estetikajn funkciojn de ĉiu ajn vivanta nacia lingvo, tiu do scias, ke ĝi devas esti por tio adekvate ekipita. Lingvo beletra, lirika prozo, sed antaŭ ĉio poezio bezonas por la plej ofte uzataj nocioj de la komunuza lingvo subtile nuancantajn sinonimojn kaj preskaŭsinonimojn. Ja la naciaj lingvoj havas ofte tutan skalon da ili. Manko de tiu ĉi riĉeco kaj malkapablo de kelkaj niaj tradukantoj donis al ni kelkajn tradukverkojn, en kiuj forpaliĝas multa ĉarmo de la originaloj. En ili oni liveris al pluraj seriozaj lingvosciencistoj — mi ne aludas Blinkenbergojn — ŝajpruvon, ke Esperanto ne kapablas fariĝi peranto de artisma literaturo. Komparinte, ili asertis — ekz. prof. Skalička, Machovec en CSR —, ke Esperanta traduko netolereble platigas la fajnriliefan bildaron de la originalo. Ni scias, ke majstroj de nia lingvo kapablis eviti tian platigon. Por tio ili devis eluzi majstre kaj inventeme ĉiujn enormajn rezerveojn — plejparte ankoraŭ latente kaŝiĝantaj — en nia lingvo mem, en ĝiaj vortfaraj ebloj kaj lingveraj aglutinaj kombinoj — Kalocsay, Rotkvič. —

Sed ili ankaŭ riĉigis la lingvon per multaj bezonaj neologismoj, sekvinte tiel la vojon de Zamenhof kaj Grabowski. Ĉi tie mi volus diri al s-ano Drs. F. R. el la Svisa Espero, ke lia imputo, ke la nunaj poetoj uzas neologismojn pro sia malkapableco, kaj lia aserto, ke la pioniroj de la Esp. poezio. Grabowski kaj aliaj ilin ne bezonis, estas parte erara, ĉar ja Grabowski liveris al ni multajn neologismojn kaj lingvajn novaĵojn, parte rezultas el lia perfekta nekompreneo pri la kriterioj de poezio.

Nia nuntempa bona poezio, komentante de Kalocsay kaj Baghy — kun ĉiu respekto al niaj malnovaj majstroj el antaŭ 40-50 jaroj — faris saltegon antaŭen!

Precipe ĉe tradukado de poezio kaj antaŭ ĉio de muzikaj tekstoj, operaj arioj, klasikaj kantoj oni povas plene aprezi la ekziston de mallongaj sinonimoj por kelkaj longaj kunmetaĵoj kaj por la vortoj kun prefikso „mal”, kion mi scias el propra sperto de kelkcent ampleksaj muziktektaj tradukoj. Formoj kurtaj, dura, lanta, softa, tarda ktp. estas bonvenaj sinonimoj ne nur pro sia koncizo — tiom grava por ĉiu verstradukanto, kiu estas silabe strikte limigita —, sed ili liveras al nia re-

Esperanto en Turing-Klubo

La membroj kiuj interesiĝas pri la starigo en la Belga Turing-Klubo kaj en Turing-Vojhelpo de esperanto-sekcio, estas invitataj interrilati kun nia membro S-ro Guy SCHMITZ, adj. regiona delegito de la B.T.K. en Bersillies-L'Abbaye (apud Solre-sur-Sambre, Hanagovio).

lative rimmalriĉa aglutina kaj afiksoza lingvo novajn valorajn rimvortojn. Kun la tempo la sinonimoj certe ricevos sian nuancon kaj fariĝos pli-malpli preskaŭsinonimoj. Mi ne volus aserti, ke la elvokiveco de la novaj radikvortoj estas pli granda, ol tiu de vortoj kun prefikso mal. Tio povas ŝajni al tiu, kiu la lingvon nemulte uzadas. Ĉe abunda parola kaj skriba uzado ĉiu aglutine farita vorto tuj elvokas la celitan nocion, sen ia antaŭa analizado. Same okazas en naciaj lingvoj, ekz. en la ĉeĥa en chost-necnost — virto-malvirto — la prefiksita vorto tuj asocias senanalize la pretan imagendaĵon. Nur ĉe unuafaje renkontita kunmetaĵo oni analize fiksas ĝian semantikan signifon. Tial la „mal”-vortoj neniam estos elpuŝitaj de kiom ajn taŭgaj neologismoj, sed ili daŭre vivos apud ili. Forvelko de plena eluzo de prefikso „mal” signifus nedezirindan malriĉigon de nia lingvo. Ja kiom da riĉiga forto, kiun oni povas envii al Esperanto, kaŝiĝas ĝuste en la mirakla prefikso mal. Kiom da nuancitaj sinonimoj ĝi al ni povas liveri: malĝojo, malgajo, malĝuo, malplezuro, maldelico; malhavi, malposedi, malbezoni; malkudri, maltriki, malfliki ktp. La verkistoj de morgaŭ ne hezitos riĉigi sian esprimaron per freŝaj sinonimoj liverontaj malkutime efikantaj rimvortojn, kiel ekz. malsofta, maltarda, malfrida, malŝrumpi k.s. Same la komunuza lingvo de la ĉiutaga praktiko sekvante la ĝeneralan plirapidigon de la vivo en epoko de atomenergio, ekonomieco kaj tempoŝparo, ĉu en radio aŭ alia praktika lingvouzado manetendos al stoko de koncizaj dusilabaj vortoj de nia poezia fakterminaro. Tia evoluo estos natura kaj neevitebla. Tiel ni vidis jam en radio-programoj kurtunda anstataŭ mallongonda. Ju pli oni uzos Esperanton en la ĉiutaga vivo des pli ekonomia kaj klara ĝi fariĝos. Kiel ni uzas „aŭto” apud „aŭtomobilo” aŭ preferas diri „li aŭtis tien” ol „li veturis per aŭtomobilo tien”, tiel morgaŭ la kvin-silaba aviadilo verŝajne ricevos du-trisilaban sinonimfraton — aviono jam naskiĝis —. Ni ne dirados fortikigita kastelo, sed burgo, delikata ĝuego, sed delico, ne sinjorina mansaketo, sed taŝo ktp. La lasta apartenas jam pli al sfero de transiro de fakter-

Korespond-Adresoj

Fino Masako Yasni, Katimachi 5 banti, Wakayamasi Japanujo kaj 11 aliaj junaj gesamideanoj en la sama urbo volas volonte korespondi kun ĝeĵunuloj pri diversaj temoj. Oni skribu al la nomita adreso.

Wilhelm Schultze Eltville Rheingau Postbox 59 Germanujo — bele afrankitaj leteroj kaj poŝtkartoj.

Petko P. Arnaudov Nikifor Popkonstantinov — 38 Pazarĝik Bulgarije instruisto de matamatiko. Li deziras korespondi kaj interŝanĝi revuojn.

minoj en komunuzan lingvon.

Ankaŭ la verbo prunteprenas multe el la dinamikeco de verbo en slavaj lingvoj. Ĝisvivos pli vastan verbigon radikoj adjektivaj kaj precipe substantivaj laŭ ekzaktaĵoj reguloj de vortfara de la inĝenia radikkaraktero sistemo de Saussure-Kalocsay-Waringhien.

Dum ĉio okazos organike, malarbitre, ĝi estos sana evoluo de lingvo kaj ne estos tasko de la Akademio de Esperanto ĝin bremsi, sed reguligi kaj unuecigi. Alia afero estis la vortaro de Azorin. Ĉi tie temis pri kontraŭfundamenta fuŝado de lingvo, misdeviado, arbitra ŝanĝado kaj reduktado de la oficiala radikaro, ridindiga derivado kaj mistifika etimologi-indiko. Koncize, la granda kapitalo ĉe ni tiom bezona por eldono de vere ampleksa 3-4 voluma Plena Vortaro, tiom sopirata de ĉiuj esperantistoj, vortaro, kiu listus multajn fakvortojn tre bezonajn en la ĉiutaga vivo, estis eljetita por verko malserioza, povanta eĉ subfosi la unuecon kaj reputacion de Esperanto. Tial estis ne nur tasko, sed deo de la Akademio interveni senhezite kaj rapide per justa juĝo kaj averto. Tio dank' al la klarvido de plimulto da akademianoj ĝustatempe okazis. La ago de Francisko Azorin meritis severan kondamnon jam tial, ĉar li estis insiste avertita pri la fuŝeco de la verko jam en jaro 1949. En tiu jaro ankaŭ mi, ricevinte al prijuĝo partojn de lia manuskripto de la preparata vortaro, petis lin rezigni pri eldono de tiu fuŝverko kaj malkonsilis al li eldoni tiel grandan verkon sen kunlaboro kun la sekiestro por la komuna vortaro en la Akademio de Esperanto.

Ĉe fino du konsiloj. Vi plendantoj kontraŭ neologismoj pretaj kontenti pri minimuma vortprovizo, se por viaj celoj sufiĉas al vi Esperanto primitiva, uzu la simplajn vortojn, ne legu la poezion kaj beletron kun neologismoj. La mirinda Eŝperanto, se vi korekte regas la gramatikon la afiksaro, permesos al vi bonan esprimiĝon eĉ per modesta vortprovizo.

LISTO DE LA MEMBROJ-KOMERCISTOJ

Antverpeno

- „In 't Duiŝken”* (*Sano Paesmans*), Lge Koepoortstr. 64: Kostumoj (5 % rab.)
Vinc Max Bolsius, Diepestr. 58-60, Antverpeno: Kuirejilaro. Tel. 32.57.85
M. Philips, K. Rogierstr. 1, Antverpeno. Korsetoj - Rab. 5-10% p.l. membroj.
F. van der Hoydonck-van den Buys, Kapelsesteenweg 549, St. Mariaburg
 Suoj — Teksaĵoj — Merceraĵoj. Tel. 74.27.86
J. Montmirail, Kortemarktstraat 53, Berchem. Arhiteko. Tel. 39.58.66 39.58.66
Morris de Ketelaere, Oostenstraat 25, Antverpeno. Privataj lecionoj
 pri lingvoj, ankaŭ pri Esperanto. Tel. 39.17.09
Sino Henny Jacques-de Ketelaere, Beeldekenstr. 31, Antverpeno. Gramofonaj
 diskoj por meminstruado. Tel. 33.75.38
Roger Jaumotte, Cyriel Buyssestr. 44, Antv. Anoncoj en tagjurnaloj. Tel. 37.47.14
K. Amerijckx, Melgesdreef 40, Merkesm. Centra Hejtado. Tel. 45.81.07
R. De Soete-Vanistendael, Dambruggestraat 234, Antv. Okulvitroj — Rab. 5%
CL. Peeters, Onderwijsstraat 68, Antverpeno. Apotekejo Tel. 35.40.67
Firmo van Iseghem & Verstraeten, St. Bernardse steenweg 631, Hoboken
 Vitraĵoj — Speguloj — Tel. 37.88.20
J. van Nereaux, Sterstraat 1, Antverpeno. Viandisto. Tel. 39.55.81
H. Peeters, Vordensteir. 58, Schoten. Ingen.: Neon-lumo, Reklamoj. T. 8148.47
H. Jacques, Lange Beeldekenstraat 31, Antverpeno. Presaĵoj. Tel. 33.75.38
Verdijck, St. Rochusstraat 174, Deurne. Ĉiaj asekuroj kaj hipotekoj. Tel. 39.06.07
P. Peelman, Volkstraat 34, Antverpeno. Fumaĵoj — Pantofloj. Tel. 37.62.55
Y. Amerijckx, Pr. Leopoldstraat, Borgerhout. Peltaĵoj
A. van den Neste, Deurnebaen 30, Merksm. Presad-inkoj. Tel. 45.78.59
J. Van Hoof, Marialei 7, Antverpeno - Pentraj-entreprenoj Tel. 39.35.33

Bruĝo

- Marcel Poupeye*, Elf. Julistr. 32. Ĉiaj asekuroj en la tuta lando Tel. 371.93
Charcuterie Strovi, Vlamingstraat. 48 (Teatroplaco) Viandvaroj. Tel. 334.08
Maison Jove, Gelmuntstraat. 29. Ĉemizoj, Gantoj, Kravatoj. Tel. 332.75
Firmo G. Verbeke, spinolarei 19: Konstrumaterialoj. Speciale naturŝtono de
 Jura. Tel. 321.85
Pan- kaj Kukbakisto R. ROSSEEL, Mariastraat 30, Konsumsalono. Tel. 338.34

Bruselo

- M. Jirousek*, 104 rue du Téléphone: reklamoj kaj litertipoj 18.77.67
Farmacisto Jacobs, 94 rue général Eenens Bruxelles 3 15.26.01
Farmacisto N. Nelis, Meise 59.13.73
„BONBONS SWINNE”, 77 rue de Nieuwenhove 44.57.36
Imprimerie Lielens, 18, rue de la Princesse 21.10.98
CARRELAGE „Carrart”, 19 avenue de Saxe 21.74.49
Viajn MEBLOJN ĉe S-ro Weyn, aĉetu rue Destouvelles, 57 15.93.97
Tinkturejo, senmakuligejo „TEX” 11. Av. du Couronnement
 Woluwe St. Lambert 70.75.82

KOMERCISTOJ kiuj senkoste propagandas por Esperanto per reklamoj en siaj butikoj

- G. Baeten*, Belpairestraat 53, Berchem. Tel. 39.22.81. Frizitoj por sinjoroj
„De Boerinekens” (Clem. Van Hassel). Estro de la trinkejo en la Flandra Operdomo
A. Roels, Montignystaat 155, Antverpeno. Ledaj artikloj-Selisto. Tel. 37.14.07
Librejo Schuttershof, Schuttershofstr. 36, Antv.: luo, aĉeto. vendo de libroj
Vojaĝ-agentejo Pier Busseti, Hopland 5, Antv.: privataj kaj grupvojaĝoj

Kaj vi aŭtoroj kun pretendoj artistmaj, ekuzu la lingvon en ĝia plena riĉeco por respeguligi en centmiloj da facetoj la mirindan variecon de la homa penso kaj artkreado. Sed ne forgesu uzi la kaŝitan trezoron en la lingvo jam disponebla. Ne fabriku neologismojn laŭkaprice kaj ne konvinkiginte pro malpenemo, ĉu la mankanta nuancovorto, sinonimo, fakvorto jam ne ekzistas en iu vortaro, en iu verko. Per konsulta reciproka kunlaboro de verkistoj — kaj tia konsulta centro povus fariĝi la fondata asocio de Esp. verkistoj kaj tradukantoj — povus e-vitiĝi tia longa eksperimentado, kiel ekz. pri sinonimo por maldekstra, kie

oni jam proponis sinistra, sinstra, lefta, linksa, goŝa. La asocio de verkistoj kunlabore kun la Akademio per rekomendo de unu formo povus sane anticipi en la evoluo de lingvo kaj savinian literaturon kaj estontajn vortarojn de superflua eksperimenta balasto. Kaj la verkantoj kaj redaktantoj ne forgesu aldoni liston de la uzitaj neologismoj ĉe la fino de la verkaĵo, se ili volas, ke la legantoj ekkonu kaj memoru la vortojn. Ju malpli da ili vi sukcesos enkonduki, ne malriĉiginte vian esprimivon, des pli digestebla kaj ŝatata estos via kreaĵo.

Jiri Korinek, Brno.